



Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) al Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Internacia Tago de Edukado, 24 januaro 2022

“Edukado estas la vojo el malriĉo kaj la fundamento por pli bona estonteco” – tiel diras unu el la multaj organizoj kiuj festos la Internacian Tagon de Edukado la 24-an de januaro. La nuna estas la kvara jaro en kiu Edukada Tago estas observata de Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj.

Malgraŭ la salutindaj klopodoj de Unesko kaj aliaj internaciaj organizoj, la vojo al profunda kaj egaleca edukado restas blokita kontraŭ milionoj da junaj homoj tra la mondo. En la jaro 2018, proksimume 260 milionoj da infanoj de la koncerna aĝo ne frekventis lernejojn – kaj en aprilo 2020 dum furiozis KOVIM-19, tiu nombro saltis provizore al 1,6 miliardoj.

Se ĉiuj infanoj en la mondo ricevus klerigon en lingvoj kiujn ili plene komprenus kaj kun aliro al moderna teknologio, nia kapablo alfronti mondajn problemojn vaste pligrandiĝus, niaj rezervoj de homa kapitalo estus multe pli altaj, kaj la Celoj de UN por Daŭripova Evoluigo estus multe pli proksimaj al plenumiĝo.

La Esperanto-movado forte subtenas altkvalitan edukadon por ĉiuj, inkluzive de edukado tra la tuta vivo. Nia movado kunigas la homojn, virtuale kaj ĉeeste, pere de la Internacia Lingvo, el multe pli ol cent landoj tra la mondo. Multaj parolantoj de Esperanto estas instruistoj, kaj multaj estas gejunuloj kiuj kredas, ke internacia kunlaboro estas la ŝlosilo por la pliboniĝo de la homaro, kaj kiuj komuniĝas inter si en unusola lingvo en internacia medio.

Ni alvokas al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, ke ili multigu siajn klopodojn por plibonigi edukadon por ĉiuj personoj, kaj ke ili kunagu kun ĉiuj kiuj kredas, ke scio alportas kompreniĝon kaj kompreniĝo kondukas al pli bona estonteco. Ni promesas nian kunlaboron kaj nian subtenon.